

Kiel drame finiĝis la vivo de Louis Pergaud

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI, 589/92-2, 1982 junio 03 kaj 05.

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-1982-92/SRI-1982-92-2-589-Claude-kaj-Andree-GACOND-Kiel-drame-finiĝis-la-vivo-de-Louis-Pergaud.mp3>

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Ni paŭzis en nia citado el la trista militkorespondado de Louis Pergaud, por povi raporti la pasintan semajnon pri la kurs-programo de la Internacia Feria Altlernejo de Kultura Centro Esperantista en La Chaux-de-Fonds. Kaj ĉisemajne ni konkludos nian raporton pri Louis Pergaud en la milito, kiu pereigis lin en 1915, ĝuste citante erojn el liaj leteroj.

A.- La 20-an de decembro 1914 Louis Pergaud en letero al sia edzino rakontas pri paca kontakto inter ambaŭ malamikaj armeoj. Ni citas lin:

Cl.- "Antaŭhierau, en la tranĉeoj, maldekstre de ni, okupitaj de la 12-a Kompanio kaj troviĝantaj je apenaŭ 80 metroj de la malamikaj tranĉeoj, okazis ĉirkaŭ la 2-a aŭ 3-a posttagmeze longa kaj brua konversacio inter germanaj kaj francaj soldatoj. Laŭ diversaj aŭditaj atestaĵoj, ĝi proksimume tiel komenciĝis; "He, Kamarad, ĉu vi bone dormis? Ni ne tro multe ĝenis vin? Ne pafu, kaj ni ne pafos." Afabla respondo el la franca flanko. Ambaŭflanke oni supreniras sur la parapeton. La Hunoj proponas "schnaps" kaj cigarojn kontraŭ pano. Kaj oni interparolas.

A.- Kaj Louis Pergaud aldonas "Ŝajnas, ke ili, parolante pri la germanoj, ne plu havas kontraŭ ni la heredan malamon, antaŭe montritan."

Cl.- La arme-estroj malpermesis kiun ajn komunikiĝon kun la malamikoj por ke similaj babiladoj ne rekomenciĝu.

A.- Iom post iom en la glaciitaj aŭ kotaj tranĉeoj la soldatoj fariĝas fatalismaj. Jen kion tiurilate skribas la aŭtoro de la Buton-Milito la 31-an de januaro 1915 pri tiu sinteno:

Cl.- "En la komenco, kiam ni iris al la tranĉeo, eĉ ĉe malluma vetero, ni ĉiamaniere atentis, zorge defilante en la flankpasejo; nun ĉe plej brilaj lumoj ni senzorge iras laŭvice, po du, ĝis niaj lokoj kaj ni estas malpli pafataj ol dum la unuaj tagoj. Ĉiuvespere mi iras viziti miajn sentinelojn, kaj kelkaj trovigas ĉe tre antaŭaj postenoj. Mi iras sentime kaj senzorge, ni ne kreas al ni viv-timojn: la mortigaj kugloj estas ĉiuj ĉu devojintaj, ĉu resaltaj, ĉu hazarde pafitaj, kio ja pruvas la vanecon de ĉia zorgemo. Sorto estas sorto, neniue eskapas, kiam sonis lia vico. La lunlumo iluminas niajn noktojn, malpeza neĝo kovras la ebenon tie-tie. Sekve niaj tranĉeoj elstaras, liverante mallumajn liniojn; la frostiĝinta grundo estas glitiga, ĉar antaŭ la malvarmo estis nur koto kaj akvo; ni atente marŝas, kaj malgraŭ tio pli ol unu falas kapon aintaŭen kaj restariĝas laŭpove.

A.- Kun la reveno de pli varmaj tagoj reakriĝis la batalemo. Jen kion je la 31-a de marto Louis Pergaud pri tio skribis al sia amiko Martinet:

Cl.- "La 18-an, 19-an kaj 20-an ni travivis terurajn kaj neforgeseblajn horojn. Ni atakis la germanan tranĉeon, post ne sufiĉa artileri-preparado, kaj du el niaj kompanioj estis heroe falĉitaj. Mi staris tie, preta ilin subteni kun mia plotono; ni jam dufoje antaŭensaltis sub mitrajlo kaj kugloj, kaj ni jam troviĝis unuflanke, pretaj impeti, kiam la ordono ĉesigi tiun buĉadon alvenis. Dum tiu antaŭenmarŝo mi perdis ok virojn mortintajn kaj dek unu vunditajn. La kugloj pretersiblis miajn orelojn, kaj tri obusoj eksplodis ĉe mia nazo bruligante miajn

orelojn sen vere vundi min. Oni ne pensis pri la danĝero, pensis pri nenio. Nur forsaltis. La aspekto de la batalkampoj estis timiga. Antaŭ ni, inter la dratoretoj germanaj, kadavroj pendis, vunditoj rampis, aliaj lamentadis; kaj la tragika nokto kun ruĝruĝa suno tiam sterniĝis. Ekpluvis; ni vadis tra sangoflakoj, cerbosplitoj. Mi neniam tion ĉi forgesos. Kaj etendiĝis la nokto, trastiita de la germanaj raketoj timantaj novan atakon; ne eblis eklevi la nazon super la parapeto ne aŭdante la kuglojn sibli.

A.- La helpo al la vunditoj estis ege manka. Ĉiam pri la sama batalo, jen kiel Louis Pergaud skribas al sia edzino ses tagojn antaŭ sia morto. "Oni ne volis ĉi-foje, kiel antaŭe, lasi la vunditojn morti inter la linioj, kaj kvankam la sovaĝeco de la Germanoj estas ja bone konata, Majoro Mistarlet, simpatia kuracisto, sin proponis por en tuta taghelo ilin elpreni. Estiĝis por ni momento vere angora. Ĉu ili pafos al li kaj la blankardistoj? Tamen, ek ! Li hisis la flagon de la Ruĝa Kruco, kaj armita per nur sia kuracista hendo, ekstaris sur la tranĉeo. Mi estis senspira. Tiu brava kuracisto estas tiel agrabla kaj ĉarma kamarado... La Hunoj estis tre korektaj. Ankaŭ ili ekstaris sur la parapeto, kaj de ambaŭ flankoj oni rigardis unuj la aliajn. Mistarlet iris, sekvate de siaj helpantoj, alvenis ĝis apud la vundito je ses metroj de la Germanoj, kiujn li soldate salutis, same kiel dum la Granda Jarcento, poste ili levis la vunditon, kaj dum la blankardistoj lin forportis li denove salutis la malamikojn, kiuj siavice lin salutis. Li revenis al niaj linioj, la kapoj malaperis malantaŭ la parapetoj, silento regis denove, kaj eĉ ne unu pafado okazis dum la cetero de la tago."

Cl.- Oni scias, ke dum la nokto de la 7-a kaj 8-a de aprilo, ĝuste kiam germanaj blankardistoj provis forporti la vunditojn ĉu germanajn, ĉu francajn, la franca armeo rompis la batal-halton. La francoj fakte pafis sur la proprajn vunditojn, kaj tie mizere pereis revundite Louis Pergaud. Lia korpo neniam estis retrevita.

A.- Tiel konkludiĝis en sia promesplena fazo verkista kariero, kiu komenciĝis en 1908 per la ekpublikigo en la revuo "Le Mercure de France" de noveloj pri bestoj. Tiu eldonejo aperigis libroforme tiujn ĉi novelojn en 1910 sub la titolo "De Goupil à Margot". Gupil estas vulpo kaj Margo pigo. Kaj la sama jaro la Akademio Goncourt premiis tiun ĉi observoplenan libron "De Gupil al Margo", kie la bestoj kavas propran konduton kaj kie Louis Pergaud provas priskribi ilian psikologion. Kiel ĉasisto en la Ĵurasa montaro li intimiĝis kun la sekreta vivo de la bestoj, kaj en tragikaj rakontoj li raportas pri tiuj ĉi observadoj. La akademianoj Goncourt aprezis tiun ĉi originalan kaj tiam tute novan priskribon de la naturo, kiu perdis sian homcentrismon.

Cl.- La revuo "Mercure de France" daŭrigis la publikigon de noveloj de Louis Pergaud. Kaj ĉiujare aperis unu aŭ eĉ du libroj, kiujn vasta legantaro atendas senpacience. En 1912 la romano "La Buton-Milito" ankaŭ tre originale raportis pri la konduto de la homidoj. Louis Pergaud ne nur humurplene rakontas pri infanaĵoj, li samtempe malkovrigas, ke la infana mondo havas propran vivon, kiun la plenkreskuloj ofte ne konas

A.- La ĉefverko de Louis Pergaud tutcerte estas la romano "Le Roman de Mirault", kiu raportas pri la reciproka amikeco, oni povus preskaŭ diri amo, kiu unuigas ĉasiston kaj ĉashundon. Denove tiu romano estas verko de observanto, kiu kamparane kaj ĉasiste priskribas tion, kion li reale travivis. Tiu ĉi romano unue aperis folietone en la gazeto "L'Humanite" kaj la redakcio sin permesis cenzuradojn de tiu por ili tre realisma verko. La libroforma apero en 1913 aperigis la kompletan tekston.

Cl.- Post la morto de la verkisto, sub la titolo "Les Rustiques" (La Vilaĝanoj) eldoniĝis noveloj, kiuj vigle rakontas pri la kamparana vivo. Restis sur la skribotablo de la tro frue

mortinta verkisto skizo de romano, kiu devis priskribi la konduton de adoleskuloj, de junaj kamparanoj, kiuj provas fari al si lokon en la rigide strukturita vilaĝa kaj familia vivo. La tri unuaj ĉapitroj, kiuj estas finverkitaj, atestas, ke refoje Louis Pergaud estus alportinta ion novan. Ankaŭ por li la adoleska mondo havas sian apartan psikologion kaj proprajn problemojn.

A.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond konkludis sian raporton pri la militkorespondado de la franca verkisto Louis Pergaud naskiĝinta ekzakte antaŭ cent jaroj. Ĝis reaŭdo!

*Kopirajto © Claude GACOND www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), junio 2014*